# Sekso kaj Egaleco

Numero 4
Oktobro 1980

Sendependa novaĵletero

Ĉi tiu numero enhavas pli da "internaj" informoj ol kutime, do pli pri virina agado en la Esperanto-movado kaj malpli pri virinoj ekster nia sfero. Legantoj havos variajn opiniojn pri tio, sed laŭ mi ĝi estas pozitiva evoluo. Ĝi signifas, ke ni nun mem ekfaras sufiĉe je praktika nivelo por plenigi preskaŭ ĉi tiun tutan numeron de SkE.

Pro la aktualeco de la temoj en ĉi tiu numero, mi estis devigata prokrasti pli frue ricevitan materialon. Mi pardonpetas al la multaj homoj, kiuj sendis leterojn kaj artikolojn por kiuj mankas spaco ĉi-foje. Mi provos aperigi iliajn kontribuaĵojn en la venonta numero.

En la fino de la unua jaro de apero de SkE, mi kaptas la okazon por danki la kunlaborantojn kaj perantojn, kies nombro ĉiam kreskas. Mi mencias precipe Dermod Quirke, kiu ne nur presas la bultenon, sed ĉi-jare ankaŭ finance helpas interalie per senpaga provizado de papero, kovertoj kaj stenciloj. Tamen, ni ne povas daŭre apogi nin sur la subvenciado de unu homo - kaj tio signifas, ke la prezo nepre devas altiĝi. SkE do ekde nun kostas 12 gld. por kvar numeroj.

Laŭ la kvanto de kontribuaĵoj, SkE plenumas bezonon, sed bedaŭrinde la nombro de abonantoj restas relative malalta. Tio nun fariĝas aktuala temo, ĉar por multaj legantoj ĉi tiu estas la lasta numero, kiun ili ricevos per sia nuna abono. Se vi trovas kunsenditan re-abonslipon, ni tre forte petas vin renovigi vian abonon. Preparo de numero de SkE postulas multe da laboro. Pruvu al ni, ke tiu laboro valoras!

# Sekso kaj Egaleco

Sendependa novaĵletero

Jarabono (4 numeroj)
12,00 gld. aŭ 15 irk.

Sendu internaciajn respond-kuponojn rekte al Anna Brennan, aŭ pagu al ŝia nederlanda poŝtĉekkonto, n-ro 4412211.

Limdato por la venonta numero: 15a de decembro.

Redaktoro

Anna Brennan
p/a Nieuwe Binnenweg 197B
3021 GA Rotterdam
Nederlando

Kunlaborantoj en ĉi tiu numero

Audrey C.E. Childs-Mee
Probal Daŝgupto
Lembe Laanest
Charles Power
Dermod Quirke
Sybil Sly

Presita de The Strangled Vole Press, Londono.

## Perantoj

Internacia (prezo: 14,50 gld.): Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Poŝtĉek-konto n-ro 37 89 64 (UEA): Banko: Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 EA Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Argentina: Hugo A. Lingua, Casilla de Correo 278, RA-2000 Rosario (S.Fe).

Brita (prezo: £3,00): Dermod Quirke, 18 Trouville Road, London SW4 8QL. Ĝirkonto n-ro 12 463 0006. Pagante per ĉeko al Dermod Quirke, eksterlandanoj bonvolu aldoni £1 por bankkostoj.

Franca: Anne Elise Amblès, 51, Rue Blanche, F-75009 Paris.

Itala: Alessandro Panerai, Via Pistoiese N457, I-50010 Campi-Bisenzio (Fi).

Japana: Hukunaga Makiko, Nerima-ku, Kamisyakuzii 1-739, Midori-sō 2-1, Tokio, 177. Ĝirkonto n-ro Tokio 0-99911.

Norvega: Margrete Landmark, Buerstad, N-3135 Torød. Poŝtĉekkonto n-ro 5 73 61 29.

Nov-zelanda: J.T. Allan, 12 Lonsdale Crescent, Wellington 3.

Usona (prezo: $6,50): Charles Power, Nieuwe Binnenweg 197B, 3021 GA Rotterdam, Nederlando. (Pago per ordinara enlanda usona ĉeko al la nomo Charles Power.)

# *Virinpolitiko ĉe UN*

Eliza Kehlet

En la lastaj semajnoj de julio ni plurfoje aŭdis en la novaĵ-elsendoj la lastajn informojn el Kopenhago pri la okazintaĵoj ĉe la UN-Konferenco de la Jardeko por Virinoj kaj la paralela Forumo organizita de ne-registaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UN. Ĝenerale tiuj informoj spegulis la favoratajn temojn de la amas-komunikiloj kaj montris nur la plej dramajn eventojn de la Konferenco.

Sed kiel evoluis la pli rutina laboro dum la du semajnoj? Eliza Kehlet (kejlet), antaŭa membro de la Komisiono de UEA pri Virina Agado, partoprenis kiel neŭtrala observanto de UEA, kiu estas ne-registara organizaĵo en konsulta stato kun la Ekonomia kaj Socia Konsilio de UN. En ĉi tiu artikolo ŝi raportas pri siaj impresoj pri la du aranĝoj.

Cetere, Eliza ĵus fariĝis estrarano de UEA. Interalie, pro la multaj novaj kontaktoj kiujn ŝi faris dum la Konferenco, ŝi estas la unua estrarano de UEA pri virina agado kaj denove eniras la Virinan Komisionon, nun kiel gvidanto.

**Oni en la gazetaro multe trumpetis la fakton, ke dekkvino da registaraj delegacioj estis sub gvido de viroj - sed oni ne same forte atentis, ke ĉiuj aliaj (ĉ. 100) estis gvidataj de virinoj - kaj ke multaj delegacioj tute ne enhavis virojn. En tiu kunteksto ni devas memori, ke en diversaj landoj ĝis nun virinoj ne havis saman aliron al supera eduko kiel viroj, kaj pro tio mankas tie ankoraŭ virinoj kun la necesaj kvalifikoj.**

**La televidraportistoj ariĝis ĉirkaŭ la aerpirato Leila Khaled kaj kelkaj aliaj spektaklaj virinoj (kiuj ne ĉiuj venis nur por altiri specialan atenton). Sed ili grandparte**

forgesis rakonti, ke dum manifestacioj de tiu aŭ alia speco, kiujn partoprenis ĉiam nur frakcioj de la tuto, miloj da aliaj virinoj serioze laboris pri la enorma tagordo kaj plenŝtopita programo, kaj en la registara konferenco kaj en la alternativa Forumo de la ne-registaraj organizaĵoj. Ofte mi, hejmenveninte, nur vespere per la televido eltrovis, kiaj manifestacioj okazis dumtage.

Ofte oni plendis pri la politikigo de la UN-konferenco, pretervidante la evidentan fakton, ke necese ĝi devas esti politika. La delegacioj estis registaraj kaj kiel tiaj reprezentis la proprajn hejmajn registarojn kaj ties liniojn. Postuli, ke virinkonferenco estu nepolitika, estas miskompreno; virinaj aferoj kaj demandoj ja postulas virinpolitikon, kaj tio devas esti normala parto de la ĝenerala politiko de lando. Ĝuste, oni neniam plu povos ŝovi la virinojn en angulon kaj admoni ilin tie prizorgi siajn proprajn aferojn.

Dum en la UN-konferenco la simultana interpretado funkciis kiel kutime - t.e. kun teknikaj kaj sindikataj malfacilaĵoj - la Forumo severe suferis je preskaŭ kompleta manko de interpretado, pro manko de monrimedoj. Volontula, foje simultana, foje sinsekva, tradukado al la franca kaj hispana ekestis sporade, tradukado al la angla kelkfoje iom pli bone funkciis.

La franc- aŭ hispan-parolantoj post nur malmultaj tagoj formis siajn grupojn kaj starigis propran programon, ĉar ili ne povis komuniki kun la angle parolanta majoritato (al kiu mi devis aparteni ĉi tie) - sed la diskriminacio estis sentebla ambaŭdirekten: usona virino plendis al mi dum interparolo pri sia nekapablo komuniki kun la minoritatoj. En Foruma plenkunsido (improvizita; la Forumo ne antaŭvidis ĝin) mi proponis esplori la eblecon solvi tiajn problemojn eble almenaŭ parte per internacia neŭtrala lingvo. La propono estis bele akceptita, sed mi forte supozas, ke ĝi mortis en paperkorbo aŭ tirkesto.

Mia persona gajno el la du semajnoj en Kopenhago estis la kontaktoj kun tre interesaj virinoj. La gajno por la virinoj en la mondo estas, apud agadplano por la dua duono de la Virina Jardeko, ankaŭ la subskribo de la UN-Konvencio pri Forigo de Ĉiuj Formoj de Diskriminacio kontraŭ Virinoj fare de multaj ŝtatoj - kaj ĝia ratifiko fare de kelkaj, kiuj espereble baldaŭ fariĝos multnombraj.

---

# "Ni devas mem pli konsciiĝi...

... antaŭ ol ni povos ŝanĝi la sintenojn de aliaj." Tio estis la konkludo, kiu plej elstaris en la fina kunsido pri diskriminacio kontraŭ virinoj, kiu okazis dum la Kongreso en Stokholmo. La partoprenantoj menciis diversajn aspektojn de la antaŭjuĝoj pri virinoj: iliajn fizikajn diferencojn de viroj, ilian rolon kiel naskantoj, la fortan influon de religioj, la nerekonon de ilia senpaga laborado. Sed multaj ĉeestantoj opiniis, ke oni ne povas plibonigi la situacion simple per novaj leĝoj. Ili atentigis, ke la tradicio ofte kontraŭlaboris iliajn personajn provojn ŝanĝi rolojn en siaj familioj. Necesas ankaŭ eduko por egaleco en la lernejoj, por apogi la privatajn klopodojn en la hejmo.

Verŝajne la plej valora aspekto de la diskutoj estis la persona enplektiĝo de pluraj parolantoj dum ĉi tiu fina kunsido. Ili evidente forte sentis la neceson pli konscii mem kaj konsciigi konatojn pri la regantaj sintenoj pri virinoj. Unu homo proponis, ke hejme oni formu grupon, eĉ se nur kun amikinoj, por evoluigi sian atenton pri tiu temo. Ĉeestanto memorigis, ke tamen la sintenoj ŝanĝiĝas nur malrapide. Sed alia replikis, ke niajn proprajn sintenojn ni povas ŝanĝi, kaj fari tion tuj. Lasta komento estis: "Ni devas fieri, ke ni estas virinoj!"

La diskutoj okazis dum tri du-horaj sesioj, sed granda parto de la unua estis perdita per ĝenerala prezento pri la tuta aranĝo rilate la kongresan temon, divido de la partoprenantoj en grupojn ktp. Multe pli da homoj ĉeestis la kontraŭvirinan branĉon de la seminario ol ni antaŭvidis, tiel ke mi lastminute devis fariĝi gvidanto de diskutrondo, aldone al la jam antaŭviditaj gvidantoj, Linnéa Edsenius kaj Märtha Andréasson. Dum la tria sesio okazis interŝanĝo de gvidantoj kun la aliaj du ĉefaj branĉoj de la seminario, pri etna-rasa kaj ekonomia diskriminacioj, kun la celo konstati la rilatojn inter la diversaj formoj de diskriminacio. La lasta formalaĵo estis prezento pri la tuta seminario dum la Dua Ĝenerala Kunsido.

Nun, sciante la kadron de la diskutoj, vi povas legi kelkajn impresojn, pozitivajn kaj negativajn, de la partoprenantoj mem.

ab

En nia grupo ni diskutis pri la diferencoj en komunikado inter viroj kaj virinoj. Dum tri kunsidoj ni provis analizi la situacion por la virino en diversaj landoj. Ni konstatis ke ekzistas diskriminacio pro la tradicio (foje per helpo de la religio, laŭ kiu la virino ofte estas malmulte valora) kaj antaŭjuĝoj, kiujn multaj virinoj mem dividas. Ni ĉiuj devos esti singardaj kaj observemaj pri tiuj antaŭjuĝoj.

Tre interese estis, ke ni la lastan kunsidon ŝanĝis diskutgrupojn por sciigi al la ceteraj grupoj pri kio ni okupis nin. Do, dum Anna Brennan, Loes Demmendaal (lus demendaal) kaj mi raportis pri niaj tri grupoj pri diskriminacio kontraŭ virinoj, la du grupgvidantoj pri rasa-etna kaj ekonomia diskriminacioj ankaŭ ŝanĝis grupojn. Tio fakte estis tre interesa, ĉar tie oni rimarkis kiel preskaŭ malamika estas la sinteno kontraŭ ni, kiuj okupas nin pri virinaj aferoj. Precipe en unu grupo oni rimarkis tiun sintenon. Ili ja, kontraŭ sia volo (ĉar ili elektis diskuti ekonomiajn aŭ rasa-etnajn problemojn), devis okupi sin pri niaj "bagatelaj" aferoj. En la unua grupo virino foriris kaj en la dua kaj viroj kaj virinoj.

Tiu temo, diskriminacio kontraŭ virinoj, estis menciita ankaŭ en la prelego, kiun prezentis Birgitta Wistrand, prezidanto de la virina asocio Fredrika-Bremer-förbundet. Ŝi faris tre ŝatatan prelegon pri la situacio por la svedaj virinoj en la socio kaj la labormerkato. Post la prelego ŝi respondis demandojn. Iva Åberg (oberj) faris skriban tradukon de ŝia prelego kaj ĝi estis disdonita al la ĉeestantoj, kiuj provis sekvi ŝian paroladon en siaj paperoj: aranĝo, kiu ne tute kontentigis ĉiujn, ĉar estis malfacile ĝui la prelegistinan voĉon, kiam oni ne komprenas la vortojn, kiujn eldiras ŝia buŝo. Ni esperantistoj ja estas tre dorlotataj!

Mårtha Andréasson ♀ (merta), Svedujo

Se oni tro emocie reagas kontraŭ la kontraŭvirinaj maljustaĵoj, oni riskas komenci kontraŭviran diskriminacion, kvankam la celo estas egaleco kun viroj. Se, tamen, oni nur intelekte konscias, ke ja ekzistas maljustaĵoj kaj do oni teorie devus fari ion pri tio kvankam la vivo estas sufiĉe komforta, oni riskas flosadi en maro de apatio.

Inter la du estas la meza vojo.

Mi iom timas, ke la tendenco dum la kunsidoj en Stokholmo estis resti ĉe la apatia ekstremo. Du aferoj prilumigis la situacion

por mi, tiurilate.

Unue, kiel diskuttemo estis menciita la pretendo, ke viroj parol-adas pli multe ol virinoj, malgraŭ ĉiuj tradiciaj asertoj. La partoprenantaj viroj bele pruvis la pretendon, kvankam la virinoj estis pli multnombraj. Oni do ricevis la impreson, ke la viroj pli volas defendi virinajn rajtojn ol la virinoj mem!

Due, plejparte mankis eksterokcidenteŭropaj partoprenantinoj. Oni tamen emas kredi, ke ĝuste tiuj estas bezonataj en tia rondo.

Rekomendoj por la estonteco? Jene:

1. Estu je la komenco de almenaŭ kelkaj seminariaj kunsidoj pre-legeto pri specifa problemo por stimuli la sekvontan diskutadon.

2. La gvidanto de la diskutgrupo havu specifajn, ne tro ĝeneralajn diskutendajn punktojn por eviti tro sencelan vageman debaton. La temoj de ĉiuj seminariaj kunsidoj estu antaŭe prikonsentitaj inter la gvidantoj por konduki al kunordigitaj konkludoj.

3. Oni elserĉu triamondulinojn por fari prelegetojn.

Diccon Masterman ♂ (dikn mastaman),
Britujo/FR Germanujo

En Stokholmo mi partoprenis en la diskutgrupo pri diskriminacio kontraŭ virinoj kaj aprobis ĝian formon kaj varme laŭdas la altan nivelon de kontribuoj. Precipe evidentiĝis la profunda pripensado kaj diligenta preparado kiujn faris la partoprenantoj. Mankis en la enhavo tempomalŝparaj kliŝoj; oni parolis nur pri faktoj kaj propraj spertoj. Aparte interesis min la raportoj kiujn donis alilandanoj.

Nancie Durham ♀ (nansi durm), Britujo

Kritikon oni rajtas havi, sed laŭ mi, ĝi devas esti pozitiva, almenaŭ konstrua. Kaj tia kritiko estas mia sola celo.

En Stokholmo mi iris al la unua kunveno pri diskriminacio kontraŭ virinoj. Partoprenis sufiĉe multe da homoj, viroj kaj virinoj. Ŝajne tiu fakto kaŭzis embarason ĉe la gvidantinoj. Ĉu oni ne antaŭe konsideris tiun eblecon?

Daŭris almenaŭ iom da tempo antaŭ ol ili dividis la grupon en tri partojn. Ĉu oni restos en la sama salono, ĉu du grupoj serĉu

aliajn lokojn, kion fari? Denove ni perdis valoran tempon. Finfine grupo sub gvidado de s-ino Eksenius foriris, kaj mi estis inter ili. Ne estis facile trovi alian lokon; ni estis forpelitaj du fojojn.

Fine la diskuto povis komenciĝi. S-ro Umeda el Japanujo rakontis pri la situacio en sia lando kaj montris ke la japaninoj estas ankoraŭ traktataj kiel duarangaj estaĵoj. Poste s-ro Blanke el GDR klarigis al ni ke en lia lando tute ne plu ekzistas diskriminacio, nek kontraŭ virinoj nek sur aliaj terenoj de la socia vivo.

Mardon ĉeestis ankaŭ s-ro Faal el Gambio (Afriko), kaj ni parolis pri virina cirkumcido kaj ĉu ni povus fari ion tiurilate. Mi atentigis, ke laŭ konsilo de virinoj el tiu mondparto (ili donis tiun konsilon dum la konferenco pri virinoj en Kopenhago), ni nepre ne enmiksiĝu en tiu afero, kio por la koncernaj homoj ŝajnas kiel nova atako de la okcidento. Kaj krom tio, ni havas ankoraŭ tiom multe por fari en la propraj regionoj.

Poste oni demandis, ĉu mi pretas dum la Dua Ĝenerala Kunsido respondi al eventualaj demandoj. Ĉar mi legis en la Kongresa Libro ke oni tiam diskutos pri la konkludoj de la seminarioj kaj diskutgrupoj, mi demandis ĉu mi devas prepari resumon pri nia diskutado. La respondo estis: tio ne estas bezonata, ĉar ni nur devos respondi al demandoj. Vendredmatenon ni kunvenis en malgranda rondo kaj mi starigis la saman demandon... kaj akiris la saman respondon.

Do venis la Dua Ĝenerala Kunsido. Kaj kiam s-ino Brennan kaj mi sidis sur la podio, d-ro Corsetti, kiu gvidis la kunsidon, petis nin fari resumon. La viroj, kiuj gvidis la aliajn grupojn, donis siajn resumojn kaj konkludojn. Nu, kion fari?

Simple ne eblis fari konkludojn, ĉar mi nenion sciis pri la aliaj du grupoj, nur pri la propra. La viroj klare eksplikis siajn temojn. Kaj ni, la virinoj, agis precize tiel, kiel atendis la viroj, montrante ke ni ne scias fari taŭgan laboron. Mi vere hontis. Ne pro mi mem sed pro la fakto ke virinoj denove donas stultan impreson.

Mi vere ne povis diri ion, mi eĉ ne sciis kiom da homoj partoprenis en nia seminario, nek kiom da viroj, kiom da virinoj, nek el kiaj mondpartoj ili venis, nek kiaj estis la konkludoj kaj planoj de nia seminario, nenion!

Ni estas virinoj kaj ni ne sentas nin duarangaj estaĵoj; ni esperas ke nia decidema sinteno iamaniere helpos tiujn virinojn, kiuj ankoraŭ ĉiutage suferas pro diskriminacio; sed ni povas fari tion

nur kondiĉe ke ni mem montru al la cetera mondo ke ni, same bone kiel la viroj, scias organizi niajn aferojn. Ni faru tion estonte!

Els Kervers-van Tholen ♀ (fan tolen),
Nederlando

La seminario interesis min kaj fakte donis al mi pli larĝan komprenon pri la multfaceta demando pri diskriminacio kontraŭ virinoj. Oni tuŝis aspektojn pri kiuj mi neniam pensis antaŭe. Ekzemple pri tio, ke la virinoj havas sian propran "lingvon". Estis ankaŭ dirite ke la virinoj havas en sia propra sinteno la kaŭzon aŭ instigon al diskriminacio.

Pripensiga estas la dilemo de la viro kiu volas esti lojala al la emancipita virino. Se li estas ĝentila, cedas al ŝi lokon ktp., oni eble diros ke li diskriminacias. Se li ne tion faras, oni diros ke li estas malĝentila.

Evidentiĝis ankaŭ ke la situacio de la virinoj estas tre malsimila, de unu lando al la alia, de unu kulturo al la alia. Pli diversa ol ni senpere konscias. Kaj mi ekpensis ke ni eble devus esti pli singardaj kiam ni alproksimiĝas al virinoj de aliaj kulturoj kaj parolas al ili pri egalrajteco. Estas eble ke ili ne deziras havi egalrajtecon, kaj ni ne rajtas trudi al ili niajn konvinkojn pri la demando. Certe ne estas nur ni kiuj pravas!

Mi estas kontenta pri la maniero aranĝi la seminarion. Sed estus dezirinde iel klopodi pli aktivigi la pasivajn virinojn kiuj neniam kuraĝas malfermi la buŝon. Tial mi proponas ke oni okazigu seminarion pri parolekniko. Dum la kongresoj oni ankaŭ devus okazigi Esperanto-kursojn por komencantaj kaj por progresintaj virinoj! Ĉu eble oni povus, nacilingve, sendi demandaron al edzinoj, ne-esperantistinoj, por klopodi eltrovi kial ili ne lernis Esperanton, kial ili partoprenas kongresojn? Ĉu ili dezirus partopreni kursojn aranĝitajn nur por kaj de virinoj?

Pepita de Caspary ♀ (kaspari), Norvegujo

# Ni laboras

POR PRODUKTI NUMERON DE SkE.
PRUVU AL NI, KE TIU LABORO VALORAS!
SE VIA ABONO FINIĜAS PER ĈI TIU
NUMERO, REABONU!



# Ignoro de virinoj

Okazas du specoj de lingva diskriminacio kontraŭ virinoj en nia socio: vorta diskriminacio kaj maniera diskriminacio. Tiuj du variaĵoj estis la temo de kongresa prelego de Probal Daŝgupto: "Lingva ignoro de virinoj". Probal akcentis ĉefe la rolon de maniera diskriminacio, kiu, li diris, estas direktita kontraŭ la lingvo-uzo de virinoj. Sed, agnoskante la apartan intereson de esperantistoj pri sia propra lingvo, li dediĉis sufiĉe da tempo ankaŭ al vorta diskriminacio, tio estas la maniero laŭ kiu lingvo okupiĝas pri virinoj.

Citante usonan lingvistinon Robin Lakoff (lejkof), Probal atentigis, ke la lingvo-uzo de virinoj kutime estas orientita al la sentoj de la parolanto kaj al ŝia rilato kun la kunparolanto. La pli "objektiva" lingvo-uzo de viroj, aliflanke, estas oportuna rimedo por atingi la celojn de la parolanto mem.

Ĉu eblas ŝanĝi la periferian socian rolon de virinoj per ŝanĝo de lingvo-kutimoj? Probal ne akceptis la konkludon de Lakoff, ke la lingvo-uzo nur spegulas la realan situacion, do necesas ŝanĝi la mondon por ke la lingvo ŝanĝiĝu. Li diris, ke ĉiuj homoj devas plenumi sian tutan lingvan potencialon kaj ne limiĝi al la rolo asignita al ili pro sekso.

En la dua parto de sia prelego, kiu temis pri vorta diskriminacio, Probal komentis, ke nia nuna interesiĝo pri seksismo en Esperanto nur postsekvas similajn diskutojn rilate al naciaj lingvoj. Li donis plurajn pensigajn ekzemplojn pri diskriminacia traktado de inaj formoj en Esperanto, kun aludo interalie al la difinoj kaj citaĵoj pri la vortoj vidvo kaj sorĉisto en PIV.

Tiu prelego estis kontribuo al la kongresa temo. Ĉeestis ĝin multaj homoj, kiuj ne partoprenis la seminarion pri diskriminacio kontraŭ virinoj. Pluraj el la postaj demandoj ne rekte traktis la enhavon de la prelego, sed tuŝis pli ĝeneralajn aspektojn de la temo, ekz. diferencojn inter la vestoj de virinoj kaj viroj. Tio implicas, ke la enhavo estis nova por multaj el la aŭskultantoj - sed krome, ke ili ne tute aprezis ĝian signifon. Certe, la esperantistaro bezonas ankoraŭ pli informiĝi pri tiu temo.

## Praktikaj ekpaŝoj

Ne sufiĉas nur nomi siajn celojn; necesas ankaŭ pensi kiel realigi ilin. Multaj praktikaj ideoj estis proponitaj dum la publika kunsido pri virina agado en la Kongreso, kiun ĉeestis pli ol 30 homoj (plejparte virinoj), sed bedaŭrinde mankis la tempo por bone trakti ilin. Tamen trarigardante ĉi tiun bultenon, vi konstatos, ke ni jam eklaboras pri du el la sekvontaj sugestoj:

Ni klopodu regule aperigi artikolojn en Esperanto-gazetoj, por konsciigi la ĝeneralan publikon pri la problemoj de virinoj. Krome, ni provizu pretan materialon por tiuj, kiuj volas prelegi pri tiu temo. Tamen al multaj virinoj mankas sperto pri publika parolado, do ni organizu kurson por helpi ilin. Por tiuj, kies ĉefa interesiĝo estas ekstera agado, ni preparu informilon por traduko. Kaj fine, ni organizu semajnfinan renkontiĝon, dum kiu ni okupiĝos pri tiuj ideoj.

Tiuj sugestoj baziĝis sur la celoj de la Komisiono pri Virina Agado, prezentitaj dum la kunsido. Ili estas:

1. Konsciigi la homojn en la Esperanto-movado pri la sociaj problemoj de virinoj.
2. Eduki esperantistinojn superi tiujn problemojn.
3. Kontakti kun naciaj virinaj asocioj.
4. Altigi la proporcion de virinoj en la Esperanto-movado.

Celoj 1 kaj 2 temas pri interna agado inter geesperantistoj, kaj 3 kaj 4 temas pri ekstera agado. Dum la kusido Loes Demmendaal metis la jenajn demandojn, kiuj rezultigis tre energian diskuton: Ĉu ni koncentriĝu pri la interna aŭ la ekstera agado? Ĉu nia laboro en la Esperanto-movado estu direktata ĉefe al virinoj (celo 2) aŭ al ĉiuj (celo 1)?

La kontribuoj estis tre variaj, kaj ne eblas paroli pri "fina decido" de la ĉeestantoj. Tamen pluraj homoj emfazis la neceson eduki nin mem por atingi aliajn. Kompreneble tio ne malhelpos, ke tiuj kiuj interesiĝas precipe pri ekstera agado dediĉu siajn energiojn al tio. Pri la dua demando la opinioj estis dividitaj; kelkaj substrekis la neceson konsciigi kaj virojn kaj virinojn, dum aliaj atentigis pri la problemoj de laboro en miksitaj grupoj, kie la viroj emas superregi la debaton. Tial unu-du ĉeestantoj proponis, ke trejnado okazu en unu-seksaj grupoj. ●

# Antaŭen kaj...

SPACAJ virinoj

La 16an de junio 1963, Valentina V. Tereŝkova, juna fabrika laboristo, fariĝis la unua kosmonaŭtino. Dua ankoraŭ ne aperis. Multaj virinoj en Soveta Unio sin proponas letere, sed la tre aktiva soveta spacprogramo en la momento ne akceptas virinajn kandidatojn por kosmovojaĝado. Generalo Vladimir Ŝatalov lastatempe malkaŝis al la brita novaĵagentejo Reuters (rojtez) siajn sentojn pri la maljusteco de la situacio - tamen el vidpunkto iom alia ol feminisma: laŭ li, irigi virojn en la kosman profundaĵon sen virina societo estas "iaspeca atenco kontraŭ la homaj rajtoj".
La usona kosmo-esplora agentejo NASA, kiu laste enspacigis homojn (ĝis nun nur virajn) en 1975, nun trejnas plurajn virinojn kaj okupiĝas pri solvo de rilataj problemoj (ekz. nulgravita menstruado) prepare al virina partopreno en la plurfoje prokrastita spacvolana programo. Tamen, du viroj konsistigas la unuan spacvolanan teamon, kiu laŭ la nuna programo faros la unuan (provan) vojaĝon en 1981.

REVUO pri aziaj virinoj

Por eŭropanoj, kiuj volas ekscii pri la vivo de japanaj virinoj, aperis en junio la 2a "internacia" eldono de ege interesa revuo - en la angla. Feminist aperas en la angla unu fojon jare (pli ofte en la japana), kaj enhavas artikolojn ne nur pri Japanujo sed ankaŭ pri Hinda Unio, Koreujo, Ĉinujo kaj aliaj landoj.
La anglalingva eldono estas havebla de The Feminist Inc., Seien Bldg. No. 502, 1-3-2 Kita Aoyama, Minato-ku, Tokio, 107 kontraŭ ¥ 1200 al Tokio 4-51570; aŭ J.A. Taudin Chabot, Celsiusstr. 43, 3817 XE Amersfoort, Nederlando kontraŭ 10 gld. al pĉk. 140264.

ESPLORO pri sporto

Dum ili ludas en sportoj kiel korbopilko, bazopilko kaj retpilko, knabinoj ne pli probable ol knaboj vundiĝos. Tio estis la eltrovo de du-jara esploro ĉe la universitato de Vaŝintono pri inaj teamoj en kvar gimnazioj. La problemoj kiuj ĝenis specife knabinojn, ekz. inflamo de tendeno, rezultis el ilia malpli bona fizika stato kompare kun la plimulto de knaboj, facile korektebla per trejnado kaj ekzercado.

DUOBLA diskriminacio

Lernolibroj pri la angla instruas pli ol nuran lingvon. Ilia prezento de la virino estas eksmoda kaj stereotipa. En la centraj paĝoj de la junia numero de The E.F.L. Gazette ("Gazeto pri la angla kiel fremda lingvo") Patricia Hill (patriŝa hil) ekzamenis plurajn kursojn por eltrovi, ĉu la prezento de virinoj pliboniĝis dum la lastaj jaroj.
Ŝi konstatis, ke la virinoj en

la libroj kutime aperas kiel dezirindaj – aŭ maldezirindaj – objektoj, taksataj nur laŭ sia aspekto. La viroj havas tre diversajn profesiojn, dum la virinoj estas dommastrinoj, sekretarioj, flegistoj k.s. Foje aperas "simbola" profesia virino, kiu tamen ne sufiĉas por kontraŭpezi la ĝenerale konvencian roldividon en la libroj. En Norvegujo kaj Svedujo "seksismaj" lernolibroj ne plu estas uzataj en lernejoj. Dum la venontaj jaroj funkcios politiko pri pozitiva diskriminacio en klopodo elradikigi stereotipajn ideojn ĉe junaj lernantoj.

SUKCESA publika protesto

Multaj japanaj virinaj agadgrupoj forte protestis, kiam ilia registaro decidis, en la komenco de junio, ne subskribi la Konvencion pri la Forigo de Ĉiuj Formoj de Diskriminacio kontraŭ Virinoj. La japana registaro opiniis, ke la postuloj de la Konvencio tro diferencas de la ekzistantaj enlandaj leĝoj. Tamen ĝi ne povis ignori la reagon de la ĝenerala publiko, kaj fine devis ŝanĝi tiun decidon tuj antaŭ la UN-konferenco en Kopenhago. Rezulte, ankaŭ Japanujo subskribis la Konvencion dum la Konferenco.

LINGVA problemo ĉe forumo

La manko de interpretado ĉe la forumo, la paralela aranĝo kun la UN-konferenco pri virinoj, kaŭzis sufiĉe elstaran problemon por trafi eĉ la raportiston de la brita inisma revuo <u>Spare Rib</u> (netradukebla titolo!). Ŝi komentis pri la superrego de la angla per la vortoj: "Estis kvazaŭ la angla estus nerimarkebla, natura, dum la aliaj lingvoj estus 'fremdaj'". Ŝi citis irakaninon, kiu diris, ke ankaŭ en la forumo ŝi fariĝas minoritatano. Bolivianino protestis, ke ŝi ne povas partopreni en la diskuto tiom kiom ŝi deziras; krome, ĉiuj afiŝoj estas nelegeblaj por ŝi, tiel ke estas malfacile eĉ trovi necesejon.

FAJROBRIGADISTINOJ

Virinoj nun rajtas labori en la brusela fajrobrigado, kiu ne nur ricevas ĉiam pli da helpopetoj, sed ankaŭ devas pritrakti pli variajn taskojn. En 1979, la brusela fajrobrigado ricevis pli ol 46 000 helpovokojn, sed nur 2 187 rilatis al incendio. Fajrobrigadistoj ankaŭ provizas malpli konatan socian servon. Necesas trovi novajn loĝejojn por la viktimoj de incendio; prizorgi infanojn, kies gepatroj kuŝas en hospitalo; foje helpi en stacidomoj kiam ne funkcias trajnoj ktp.

Informojn por ĉi tiu rubriko provizis: ♂Charles Power (ĉarlz paŭr), Ned.; ♂Probal Daŝgupto, Hind.; ♂Herman Deceuninck (dekenink), Belg.; ♀ Yamakawa Setsuko, Jap.

## ...malantaŭen

# PROPORCIOJ DE VIRAJ & INAJ MEMBROJ DE UEA

| Lando | Viraj membroj | Virinaj membroj | Procentaĵo de virinoj |
|---|---|---|---|
| Acoroj | 1 | - | - |
| Afganujo | 1 | - | - |
| Albanujo | 1 | - | - |
| Alĝerio | 1 | - | - |
| Ned. Antiloj | 1 | - | - |
| Argentino | 60 | 11 | 15,49 % |
| Aŭstralio | 75 | 43 | 36,44 % |
| Aŭstrujo | 47 | 12 | 20,34 % |
| Belgujo | 142 | 46 | 24,47 % |
| Bolivio | 1 | - | - |
| Brazilo | 235 | 42 | 15,16 % |
| Britujo | 221 | 93 | 29,62 % |
| Bulgarujo | 75 | 19 | 20,21 % |
| Ĉeĥoslovakujo | 94 | 28 | 22,95 % |
| Ĉilio | 11 | 2 | - |
| Ĉinujo | 10 | - | - |
| Danlando | 87 | 35 | 28,69 % |
| Ebura Bordo | 1 | - | - |
| Egiptujo | 3 | - | - |
| Ekvadoro | 2 | - | - |
| Etiopujo | 1 | - | - |
| Filipinoj | 1 | 1 | - |
| Finnlando | 126 | 124 | 49,6 % |
| Francujo | 401 | 162 | 28,77 % |
| Ganao | 2 | - | - |
| FR Germanujo | 322 | 90 | 21,84 % |
| Germana DR | 30 | 4 | 11,76 % |
| Greklando | 12 | 7 | - |

| Lando | Viraj membroj | Virinaj membroj | Procentaĵo de virinoj |
|---|---|---|---|
| Koreujo | 27 | - | 0 % |
| Kostariko | 3 | - | - |
| Kubo | 1 | - | - |
| Kuvajto | 1 | - | - |
| Libano | 1 | - | - |
| Luksemburgo | 11 | 3 | - |
| Madagaskaro | 1 | - | - |
| Malajzio | 1 | - | - |
| Malavio | 1 | - | - |
| Malto | 1 | - | - |
| Maroko | 2 | - | - |
| Martiniko | 1 | - | - |
| Maŭricio | 1 | - | - |
| Meksiko | 18 | 2 | 10 % |
| Monako | 1 | - | - |
| Mongolujo | 1 | - | - |
| Nederlando | 247 | 173 | 41,19 % |
| Nepalo | 1 | - | - |
| Nigerio | 3 | - | - |
| Norvegujo | 67 | 20 | 22,99 % |
| Novzelando | 34 | 27 | 44,26 % |
| Pakistano | 4 | - | - |
| Panamo | 1 | - | - |
| Peruo | 20 | 11 | 35,48 % |
| Pollando | 79 | 48 | 37,80 % |
| Portoriko | 1 | - | - |
| Portugalujo | 33 | - | 0 % |
| Rumanujo | 32 | 6 | 15,79 % |

| | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Hinda Unio | 12 | 2 | - | Salvadoro | 1 | - | - |
| Hispanujo | 143 | 13 | 8,33 % | Senegalio | 2 | - | - |
| Honkongo | 4 | - | - | Singapuro | 2 | - | - |
| Hungarujo | 133 | 32 | 19,39 % | Sirio | 1 | - | - |
| Indonezio | 2 | - | - | Sovetunio | 70 | 9 | 11,39 % |
| Irako | 2 | - | - | Srilanko | 3 | - | - |
| Irano | 9 | 3 | - | Sudafriko | 15 | 2 | - |
| Irlando | 6 | 1 | - | Sudano | 1 | - | - |
| Islando | 31 | 2 | 6,06 % | Svedujo | 340 | 154 | 31,17 % |
| Israelo | 42 | 13 | 23,64 % | Svislando | 121 | 59 | 32,78 % |
| Italujo | 168 | 66 | 28,21 % | Tajlando | 2 | - | - |
| Jamaiko | 1 | - | - | Tunizio | 1 | - | - |
| Japanujo | 357 | 29 | 7,51 % | Turkujo | 1 | - | - |
| Jemeno | 1 | - | - | Urugvajo | 4 | - | - |
| Jordanio | 1 | - | - | Usono | 315 | 107 | 25,36 % |
| Jugoslavio | 130 | 44 | 25,28 % | Vatikano | 1 | - | - |
| Kameruno | 1 | - | - | Venezuelo | 12 | 4 | - |
| Kanado | 59 | 24 | 28,92 % | Vjetnamujo | 3 | - | - |
| Kenjo | 2 | - | - | Zairio | 4 | - | - |
| Kolombio | 21 | 2 | 8,7 % | | | | |
| | | | | Sumo | 4 582 | 1 575 | 25,58 % |

KVARONO DE LA INDIVIDUAJ MEMBROJ DE UEA ESTAS VIRINOJ

La lasta statistiko pri la proporcio de virinaj membroj de UEA estis farita antaŭ 14 jaroj. Ĝi montris, ke proksimume 24% el la individuaj membroj estas virinoj. Finfine ni havis la eblecon denove ellabori tiun statistikon - kaj konstatis, ke la situacio apenaŭ ŝanĝiĝis. Ankoraŭ nur 25,58% el la membroj estas virinoj.

La supraj ciferoj rilatas al junio 1980. Ili do kompreneble ne inkluzivas aliĝojn enskribitajn post tiu dato, kaj do iom diferencos de la definitiva statistiko por 1980, kiu aperos en la marta numero de Esperanto venontjare. Tamen, ne estas kialo por supozi, ke la bazaj proporcioj signife ŝanĝiĝos intertempe.

La unuaj du kolumnoj montras respektive la nombrojn de viraj kaj virinaj membroj, kaj la tria la procentaĵon de virinaj membroj en ĉiu lando. La kategorioj de membreco ne estas distingitaj, do membroj-abonantoj, membroj kun Jarlibro, simplaj abonantoj, dumvivaj membroj ktp. estas kalkulitaj kune. (Tute precize, simplaj abonantoj, kiuj ricevas nur la revuon <u>Esperanto</u>, ne estas rigardataj kiel membroj, tamen ili estas kunlistigitaj.) <u>Ne</u> estas inkluzivitaj asociaj membroj, tio estas membroj de aliĝintaj landaj asocioj, kiuj ne mem pagas kotizon rekte al UEA. En pluraj landoj estas tro malmulte da membroj por ke havu sencon kalkuli la procentaĵon de virinoj. Ni do kalkulis tion nur kie estas entute pli ol 20 membroj.

En <u>neniu</u> lando estas pli da virinaj ol da viraj membroj. En Finnlando la nombroj estas preskaŭ egalaj, kun 124 virinoj kontraŭ 126 viroj. Post Finnlando sekvas Novzelando, kun 44,26% da virinaj membroj, kaj Nederlando kun 41,19%. Kun pli ol 30% da virinaj membroj estas laŭvice (malaltiĝante) Pollando, Aŭstralio, Peruo, Svislando kaj Svedujo.

Tute ne havas virinajn membrojn Portugalujo kaj Koreujo, kie estas respektive 33 kaj 27 viroj. Verŝajne pli surpriza tamen estas la rezulto el Islando, kie nur 6,06% de la membroj estas virinoj, aŭ 2 kontraŭ 31. Pri ĉiuj el tiuj landoj oni povus konsideri la ciferojn kiel tro malaltajn por esti vere signifaj. Tion oni ne povas diri pri la kvare plej malbona, Japanujo, kun nur 29 virinoj kontraŭ 357 viroj. Sekvas (altiĝante) Hispanujo, Kolombio, Meksiko, Sovetunio kaj Germana DR, kun de 8,33% ĝis 11,76%.

Ekzistas tuta vico da landoj kie estas nur unu-du membroj. Estus tro banale komenti ke tiuj unu-du estas preskaŭ ekskluzive viroj. Eble estus pli utile demandi, ĉu tiu fakto estas efektive tiel banala.

Tiu tabelo, kiel dirite, ne montras asociajn membrojn. Povus esti, ke komparo de la proporcioj inter tiuj montrus sufiĉe malsimilajn rezultojn de la individuaj membroj. Membreco de UEA estas multekosta, kaj ne facile pagata en ĉiuj landoj. Sed preskaŭ ĉiuj sukcesas aliĝi al sia landa asocio. Ofte okazas, ke nur unu el esperantista paro kotizas rekte al UEA - ne necesas diri kiu el la du, en la plimulto da kazoj. (Cetere, kvankam tio ne influas la jenajn ciferojn, notindas, ke ofte la edzo el paro estas membro-abonanto dum la edzino estas simple membro, kaj do legas "lian" revuon.)

ab

# ARĤIVO DE PRELEGOJ
## pri la virina demando

Celo: La unua celo de KVA, diskutita en Stokholmo (vidu p. 11), estas "Konsciigi la homojn en la Esperanto-movado pri la sociaj problemoj de virinoj". Unu efika maniero realigi tiun celon interne de nia movado estas per prelegado al lokaj grupoj ktp. Tamen, ne ĉiuj homoj kiuj deziras kunlabori havas la necesajn tempon aŭ sperton por mem kunmeti originalan prelegon pri la temo. Ni do proponas krei arĥivon de pretaj tekstoj, kiujn vi povos peti, se vi ricevos inviton prelegi. (Ni atentigas, ke pluraj el la tekstoj konsistos nur el notoj, do ili tamen postulos prilaboradon kaj detaligon de la prelegonto.)

Kunlaboro: Ĉu vi iam prelegis pri la situacio de virinoj? Se vi pretas disponigi vian tekston al aliaj prelegontoj, bonvolu sendi kopion al Anna Brennan (p/a Nieuwe Binnenweg 197B, 3021 GA Rotterdam). Prefere laŭeble kompletigu notojn, tiel ke ili estu kompreneblaj por aliaj. Ni estus dankaj, se vi samtempe sendus mallongan resumon (1 alineo) de la enhavo por helpi nin krei indekson.

Indekso: Por ke interesatoj sciu, kio estas havebla, ni aperigos mallongajn resumojn de la enhavo de ricevitaj tekstoj en venontaj numeroj de SkE. Poste ni produktos liston de titoloj kun resumoj por petantoj.

Ĉi-numere: La prelego de Probal Daŝgupto raportita sur p. 10 de ĉi tiu numero de SkE estas la unua ero en nia kolekto. Sufiĉe plenaj notoj estos baldaŭ haveblaj.

Por ricevi: Ni anoncos detalojn pri havebleco de tekstoj en la venonta numero. Ni atentigas vin, ke temas pri servo de KVA por plenumi la difinitan celon menciitan supre. Bonvolu do peti la materialon nur se vi efektive planas utiligi ĝin por prelego aŭ artikolo.

# SEMAJNFINO EVA

Esperantistaj Virinoj Aktivaj
28 februaro – 01 marto 1981

La eblecoj pri virina agado en la Esperanto-movado estas limigitaj dum la interesatoj restas izolitaj en apartaj urboj kaj landoj. Pro tio ni organizas apartan semajnfinan renkontiĝon por virinoj, kiuj deziras pli aktive okupiĝi pri esperantista virina agado.

Por la semajnfino jam ekzistas preta labordokumento: la Monda Agad-plano, diskutita en Kopenhago. Ni intencas tradukigi elektitajn paragrafojn – la tuto ampleksas libron – por diskuti, kiel ni povas rilatigi ĝiajn rekomendojn al la virina laboro en la Esperanto-movado.

La aranĝo okazos en la Centra Oficejo de UEA en Rotterdam, en la semajnfino de 28 feb. – 01 mar. En la vespero de la 27a estos neformala renkontiĝo. Ni ne povas akcepti pli ol 15 partoprenantojn; tial ni petas vin urĝe plenskribi kaj resendi la aliĝilon. La limdato por aliĝo estas la fino de la jaro. Ni anticipe pardonpetas, ke se aliĝos pli ol 15 homoj, ni devos elekti inter ili surbaze de geografiaj konsideroj kaj jama aktiveco pri virina agado. Ne gravas, se via scio de Esperanto ne estas perfekta, sed ja necesas, ke ĉiuj partoprenantoj kapablu senĝene kompreni kaj uzi ĝin.

Por tiuj, kiuj volas resti post la semajnfino, ni proponas ekskurson al Hago en la sekvonta lundo por turismado kombine kun vizito al virina instanco. La vojaĝkosto al Hago: 7 gld. Se vi deziros resti kelkajn pliajn tagojn en Rotterdam, aŭ pluiri al Amsterdam, ni volonte rezervos hotellokojn por vi.

Ni rezervos ĉambrojn en Hotel van Walsum tuj apud la Centra Oficejo. Proksimuma tarifo estas jena: 1-persona ĉambro kun duŝo, 48 gld.; sen duŝo, 40 gld.; lito en 2-persona ĉambro kun duŝo, 38 gld.; sen duŝo, 31 gld. Ĉiuj prezoj inkluzivas matenmanĝon. Ni provas ankaŭ aranĝi eblecon gasti ĉe esperantistoj en Rotterdam.

Ni poste petos de partoprenantoj pagon de 25 gld. por vespermanĝo en la 27a kaj tagmanĝoj en la 28a kaj 1-a. Necesos mem pagi vespermanĝon en la 28a (ĉ. 15–20 gld.)

# SEMAJNFINO EVA : ALIĜILO

ESPERANTISTAJ VIRINOJ AKTIVAJ
28 februaro - 01 marto 1981

Nomo: Naskiĝjaro:

Adreso:

Lando: Nacieco:

Bonvolu rezervi por mi unu lokon de (datoj) ............... ĝis ............... en: (bv. hoki)

| | | |
|---|---|---|
| 1-persona ĉambro | (kun duŝo) | ▱ |
| | (sen duŝo) | ▱ |
| 2-persona ĉambro | (kun duŝo) | ▱ |
| | (sen duŝo) | ▱ |

Mi preferus laŭeble gasti ĉe esperantisto ▱

Mi deziras partopreni la ekskurson en la 2a de marto ▱

-o-oOo-o-

Bv. respondi la jenajn demandojn kaj doni detalojn:


Ĉu vi aktivas en iu (ne-esperantista) virina asocio?

Ĉu vi jam partoprenas en iuspeca virina agado?

Ĉu vi havas intereson pri aparta speco de virina agado?

Ĉu vi havas kromajn proponojn pri la semajnfina programo?

Bv. resendi vian aliĝilon al A. Brennan, p/a Nwe Binnenweg 197B, 3021 GA Rotterdam, Nederlando, antaŭ la 31a de decembro. Ne sendu monon; ni poste petos pagon de 25 gld. pro la manĝoj.




Mi protestas kontraŭ la aserto de T. Bormann en SkE n-ro 2/80, ke la situacio de virinoj en GDR similas al tiu en okcidentaj industriaj ŝtatoj. Indus scii ĉu liaj scioj pri virinoj en GDR devenas el propraj spertoj aŭ okcidentaj amaskomunikiloj. Laŭ miaj spertoj kaj mia propra familia vivo la mastruma laboro estas egale dividita en multaj familioj, ĉefe junaj. Rilate al gazetaraj ŝercoj mi kuraĝas diri ke la ŝercoj en gazetoj de GDR neniel reale respegulas nian vivon.

La fakto ke multaj altaj postenoj ankoraŭ estas okupataj de viroj ne el si mem pruvas neegalrajtecon de virinoj. Necesas konsideri ke vera egalrajteco ekzistas nur ekde 35 jaroj kaj la novaj generacioj simple ankoraŭ ne sufiĉe postsekvis. Krome estas fakto ke ĝis nun ĉiam virinoj naskas infanojn kaj pro tiu biologia funkcio ili neeviteble dum pluraj jaroj devas iomete retiriĝi el la socia vivo, kvalifikado ktp.

Michael Lennartz ♂, GDR

Mi deziras okupiĝi pri la kontribuo de Thomas Bormann (SkE 2/80, p. 20).

Kara, preskaŭ egalrajteca, kamarado!

Ne necesas, ke oni kompatu la virinojn en GDR, ĉar estas neforigebla fakto, ke ni ĝuas egalrajtecon laŭ la bazaj principoj, por kiuj la antaŭaj generacioj ankoraŭ devis batali. (Oni legu ĉe Klara Cetkin!)

Kompreneble aperas en gazetoj ŝercoj rilataj al virinoj same kiel al viroj. Kompreneble oni primokas tiel nomatajn "rudimentojn de la pasinteco" de ambaŭ seksoj. Jes, ekzistas ankoraŭ "paŝaoj", kiuj deziras esti priservataj. La procezo de la edukado neniam finiĝas. La homoj ne estas dioj.

La tri faktoj de vi menciitaj pruvas nenion! En la konstato, ke nur malmultaj virinoj estas politikaj kaj ekonomiaj ŝtataj funkciuloj, vi pravas. Pri tio kulpas diversaj kaŭzoj (problemoj), kiuj estos ankoraŭ studendaj. Unu el ili estas, ke viroj ne devas naski. Do, vera cent-procenta egalrajteco neniam povas efektiviĝi. Kaj tion ni ne priploras.

Hella Sauerbrey ♀ (hela saŭrbraj), GDR

Kiel en antikveco, tiel nuntempe al virino oni atribuas la saman valoron: en la antikva epoko kaj nuntempe oni parolas pri la nekonstanteco de la virino.

La virinoj en antikveco vivis ne tre bone, ĉar ili ne havis profesion. Ili ĉiam estis dependaj de iu alia. Aliflanke la rolo de la virino en politiko estis pli granda. Ili ne voĉdonadis nek laboris en ŝtataj servoj sed iliaj influoj sur politikan vivon pere de la viroj estis pli granda ol nun. Eĉ Aristofano montras, ke la virinoj povas pli aktive kontribui al politika vivo, se ili agas laŭ organizita maniero.

Nun en multaj landoj, la egaleco inter la viro kaj la virino regas. La virino partoprenas aktive en socia kaj politika vivo, kaj oni rigardas ŝin kun estimo kaj respekto, precipe en nia lando. Sed en multaj familioj la roloj inter la viro kaj virino estas dividitaj ne egale. Fakte ĉio tio turmentas la virinon kaj malhelpas ŝin en ŝia kultura disvolviĝo. La ĵaluzo de la viro mortigas ĉiujn sentojn de la virino. La virino nepre devas liberiĝi de ĉi tio. Nuntempe ŝi jam ne plu devas toleri ĝin. Ĉiuj virinoj en tia situacio devas forlasi tiajn malbonajn edzojn, kiuj eble tiam pripensos siajn agojn. Tio kontribuos al plibonigo de la estontaj interrilatoj en familioj.

Ŝajnas al mi, ke profunde en sia koro kun emocio multaj virinoj atendas tiun momenton kiam, kiel la antikva virino, ŝi estos forportita de vera viro. Sed kie troviĝas nun tiaj viroj?

Elena Rauf ♀, Bulgarujo

La plej grava tasko de KVA, komprenebla laŭ mi, estas, kiel oni povas pli efike kaj vigle disvastigi Esperanton. Oni

devas utiligi la influojn de la virinoj por Esperanto, precipe tiu de la instruistinoj en la lernejoj.

Se en iu lando ekzistas grava virina organizaĵo, oni devas iurimede enigi Esperanton en ĝian instruadon tie. Ni devas akceptigi nian ideon en diversaj socioj kaj organizaĵoj.

Se la socioj de nacioj pri aliaj nacioj plialtiĝus, se la kulturo ĝenerala de la mondo altiĝus, kaj la malliberaj landoj liberiĝus, multaj diversformaj diskriminacioj de la mondo senperforte malaperus.

Mi kredas tutanime, ke la plej homa aktiveco por ni kiel esperantistinoj, estas nia energia helpo al tiu grava movado Esperanto, por plialtigi la nivelon de la monda kulturo.

Ĵila Sadigi ♀, Irano

---

# MUZIKO

**PER NIA NURA VOL'**

Kasedo kun libreto eldonita de "Parola Kulturo", Romo, 1980. Aĉetebla de la libroservo de UEA: 18 gld. + sendokosto 3 gld.

Nia muzika kulturo ĵus pliriĉiĝis je unu kasedo, kaj nia inisma kulturo komencas vere ekzisti. Aperis kasedo de inismaj kanzonoj en Esperanto kantitaj de Suzana. Ŝia bela kaj nekutima voĉo, la fonaj voĉoj, fluto, gitaroj, kaj la bona teknika kvalito igas la tuton belsona kaj aŭskultinda; kunestas faldlibreto enhavanta spritan kaj humuran "preterkondukon" de Ana Brenan, kaj ĉiujn tekstojn kun komentoj.

Suzana liveras al ni, en poezia kaj muzika vesto, tutan aron da inismaj (aŭ prainismaj) voĉoj pri la vivorealo de virinoj; pro tiu realismo ilia esprimvaloro estas internacia kvankam ili originis en Francio kaj Italio, ĉar ŝajne en multaj landoj same grizas la hejma vivo, same duonas la socia rol'.

Inter tiuj diversepokaj kaj diverstemaj kanzonoj menciindas "La viroj", ironia kritiko pri la subpremado de virinoj; gravas la fakto ke ĝin verkis kaj kantas viro, sed mi bedaŭras ke en ĉi tiu kasedo kantas ĝin virino, ĉar mi timas misan komprenon de ĝi, nome kiel kontraŭviran atakon far inoj (tiel viroj emas taksi inismon).

---

Atentigas nin pri la kompleksaco de rolŝanĝoj la tiel nomita "Balado pri Ana Brenan", sed ĝi estus laŭ mi pli celtrafa se la konkludo ne preterlasus la veran problemon de profundaj ŝanĝoj kaj ne limigus sin al inversigo de roloj.

Sintezas la inismajn luktojn la kanzono (eĉ la titolo mem) "Ni jam enuis", fama en italaj inismaj rondoj, eble baldaŭ en inismaj esperantaj medioj ...

Surprizas la nova versio de la famkonata "Mariŝa", sed vi mem malkovru la ceterajn kanzonojn kiuj en tono ĉu humura aŭ kolera, ĉu lamenta aŭ kuraĝa, traktas monaĥinecon, politikan lukton, socian rolon ktp.

Pro tiu kasedo dankendas grupo de romaj kunordigintoj kaj muzikistoj, kaj la tradukinto/reverkinto, Renato Korseti. Jes, temas pri viro; nu, ĝojigas ke li tiom kunlaboris, sed ... mi esperas, ke ankaŭ inoj tradukos esperanten. Tiu ĉi estu nur la unua tiuspeca kasedo; abundas nun belaj inismaj (aŭ simple devirinaj) kanzonoj ... kaj verkoj! Ni kreskigu nian internacian inisman kulturon, per nia nura vol'!

Anne Amblès ♀ (an ables), Francujo

---

## INDEKSO por la jaroj 1979–1980.

Provnumero


Svisaj virinoj salutas (I. Thomann-Baur) p. 3
Egaleco kaj la Internacia Lingvo (ab, O. Hagemann) 4
KVA 6
Letero-propono (E. Lapenna) 7
ISU en Stokholmo 7
Nova disko (cp) 8
Virina agado en la Esperanto-movado (M. Turková, M. Böckmann) 8
Egaleco ĉe la laboro (diversaj) 10
Virinoj en Hinda Unio: Honora sed ombra rolo (M. Daŝgupto) 13
Pensoj pri komunikado (J. Junger-Kurpershoek) 17


Numero 1


Fratina saluto el Oksfordo (M. Boulton) p. 3
Leteroj 5
Tra la mondo: Brazilo (M. Almada); Hinda Unio (s-ino Saranath); Estona SSR (L. Laanest) 7


---

Komisiono pri Virina Agado (A. Brennan, L. Dommendaal) 11
Antaŭen kaj malantaŭen 12
Venu al Stokholmo por debati pri diskriminacio (ab/ld) 14
Svedujo (ab, M. Andréasson) 16
Seksa malegaleco: vira vidpunkto (D. Masterman) 18
Pri la roloj de la seksoj en la infana literaturo
(A. Rooselaar) 21

Numero 2

Kio kaj Egaleco? (C. Power) p. 1
Novaĵoj el Japanujo (ab) 3
KVA: Virinoj en Esperantujo (ab/ld) 5
Leteroj 6
Tra la mondo: Pollando (Z. Borowiec) 10
Antaŭen kaj malantaŭen 12
Kion faras nia jardeko? 14
Por la Konferenco en Danlando: Aŭstralio pretiĝas (G. Kirkwood) 16
Virinaj aferoj; ĉu jam forgesitaj? (M. Andréasson) 17
Pli da leteroj 19
Kontraŭ seksisma lingvo-uzo (W. Bormann) 21

Numero 3 (kun suplemento)

Diskriminacio (A. Amblès, F. van Zoest) p. 3
Antaŭen kaj malantaŭen 4
Letero el ... Kabulo? (A. Hofulah) 6
SkE ... Novaĵoj 8
Virina cirkumcido (M. Andréasson) Supl. p. 2
La blinda virino (L. Hoffmann) 3
Virinoj en la islama mondo (Ĵ. Sadigi) 6
Ĉu ekzistas diskriminacio kontraŭ virinoj en la E-movado? 9
Vira, ina aŭ neŭtra? (A.I. Belkin) 11
La dommastrino nekompensata (K. Ording Haarr) 16

Numero 4

Virinpolitiko ĉe UN (E. Kehlet) p. 3
Ni devas mem pli konsciiĝi ... (diversaj) 5
Ignoro de virinoj 10
Praktikaj ekpaŝoj 11
Antaŭen kaj malantaŭen 12
Proporcioj de viraj kaj inaj membroj de UEA (ab) 14
Arĥivo de prelegoj pri la virina demando 17
Semajnfino EVA + aliĝilo 18
Leteroj 20
Muziko: Per nia nura vol' (A. Amblès) 22